# KIEL DIRI TRIMANIERE

## (7-A VIDEOLECIONO)

Celata publiko:
Lernintoj de baza kurso de Esperanto.

**Antaŭtaksita kvanto de la videoj: 14**

**Periodeco de la publikigoj: ĉiusabate.**

En interparolo kun Rita pri la ideala urbo,

Georgo, kiel urbanizisto, diris, ke estas tre bezonaj stratoj kaj placoj bone arbarumitaj.



Dialogante kun sia amindumantino pri la perfekta urbo, la urbanizisto Georgo reliefigis la necesegon de vojoj kaj placoj plene arboplantitaj.

En konversacio kun sia amatino pri la plej bona urbo, Georgo, kiu estas urbanizisto, elstarigis, ke necesegas stratoj kaj placoj multe arbarigitaj.

**Purigado de urbaj defluaĵoj**




Li kredas, ke bone planita defluig-sistemo estas esenca por la salubreco de la urbo kaj por la saneco de la urbanoj.

Laŭ lia opinio, efike strukturita defluiga tubaro estas tre grava por la salubrigo de la urba medio kaj por la sanigo de la urbanaro.

Li defendas la ideon, ke inteligente aranĝita defluilejo estas utilega por la salubriĝo de la urba strukturo kaj por la sano de la popolo.



VENTOENERGI ILOJ

Por Georgo la puraj energioj estas ĉies plej protektodonaj energiaj rimedoj.



AKVO-ENERGIA CENTRALO

Georgo estas certa, ke la renoveblaj energioj estas la plej protektemaj publikaj kaj privataj energiaj provizoj.



SUNENERGIAJ PANELOJ

Georgo certas, ke la nemalutilaj energioj estas la plej protektaj energiaj fontoj por individuoj kaj kolektivoj.



**Piedira ponto**

Li estas konvinkiĝinta, ke multaj trafiksignaloj, krom bele dezajnitaj piediraj pontoj kaj florbedoj, multe kontribuas por la trankviligo de la stratirantoj.




**Trafiksignaloj**

Li konvinkiĝis,

ke multe da trafikaj signaloj, krom bele konstruitaj piediraj pontoj

kaj bedoj el floroj, multe helpas en

la sereneco de la irantaj homoj.



**Florbedo**

Li estas konvinkita, ke multaj signaloj de trafiko, krom bele arkitektitaj piedirpontoj kaj floraj kultivejoj, multe helpas por la trankvileco de la irantoj.





**Se dependus de lia volo, ĉiuj lernejoj estus ekipitaj per la plej freŝaj teknikaj novaĵoj en la tereno de Pedagogio.**

**Laŭ lia volo, ĉiuj edukejoj devus ekipiĝi per la plej ĵusaj lernigaj rimedoj.**

**Se li povus, ĉiuj lernejoj estus provizitaj per la plej modernaj instruaj rimedoj.**

Li havas certecon pri tio, ke se ĉiosciaj instruistoj-robotoj instruus la lernoklasojn, la lernantaj notoj estus multe pli ofte bluaj ol ruĝaj.



Li ne dubas, ke se ĉiokonaj robotaj instruistoj gvidus la klasojn, ili multe furorus, kaj ĉiuj klasanoj sukcesus multe pli bone en la lernado.

Li havas certecon, ke se ĉiosciantaj robotoj rolus kiel instruistoj, la lernantara rendimento estus multe pli alta ol sen ili.

*Nu, tio estas lia opinio.*
*Ĉu li pravas?*



Li sonĝas pri estontema publika resanigejo, kie mankus neniaj elektronikaj resanigiloj kaj medikamentoj.

Li imagas avangardan ĉies hospitalon, en kiu mankus neniaj resanigaj elektronikaj instrumentoj kaj farmaciaĵoj.

Li revas pri ideala popola kuracejo plena je ĉiaj elektronikaj aparatoj kaj kuraciloj.



Li eĉ projektis maketon pri voja reto celanta evitigi malrapidan trafikon en la enirejo de sia urbo.

Li eĉ konstruis etmodelon de vojaro, kiu celas irigi pli rapide la trafikon en la enira parto de lia loĝurbo.

Li eĉ faris maketon pri trafikcirklo kontraŭ malrapidema veturila kunirado ĉe lia urba enirejo.



Policistoj

Policistoj bone armitaj kaj trejnitaj, gvatkameraoj en ĉiuj stratanguloj kaj prizonoj je maksimuma sekureco estas tre gravaj. Jen lia penso.



Strata gvatkamerao

Policanoj plene armitaj kaj orientitaj, gvataj kameraoj en ĉiuj stratoj kaj maksimum-sekuraj prizonoj estas necesegaj. Tion li kredas.



Prizono je maksimuma sekureco

Efike armitaj kaj preparitaj policanoj, ĉieaj strataj observaj kameraoj kaj malliberejoj je plej alta sekureco estas gravegaj. Jen estas lia opinio.







Se li estus leĝopova, elektraj aŭtomobiloj, selektaj rub-kolektujoj kaj alternado de aŭtaj numer-platoj estus devigaj por ĉiuj grandurbo-loĝantoj.

Se li havus leĝan povon, aŭtoj movataj per elektro, rubujoj por selektitaj forĵetaĵoj kaj alternado de aŭtomobiloj laŭ ties licenc-plato estus trudaj al ĉiuj grandurbanoj.

Se li estus leĝa aŭtoritatulo, aŭtomobiloj je elektro, selektaj rubujoj kaj interalternado de aŭtoj laŭ ties matrikul-platoj estus obeigaj al ĉiuj vivantoj en la metropoloj.

# Organizis: Josenilton kaj Madragoa

